Aruŝo sabaton, la 3-an de aŭgusto 2024 numero 1

# La Voĉo de Kilimanĝaro

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

## Urbestra salutparolo



Estimataj gekongresanoj, karaj esperantistoj!

*Karibu Arusha,* bonvenon al Aruŝo.
Por la urbestro de Aruŝo kaj por nia urbo estas honoro akcepti unuafoje en Afriko kaj en Tanzanio la Universalan Kongreson de Esperanto – rimarkindan renkontiĝon, kiu ne nur kunigas personojn de diversaj horizontoj, sed ankaŭ festas la idealojn de paco, amikeco kaj reciproka interkompreniĝo.
La emo de la Esperanto-movado kontribui al mondo pli sana, pli varia estas subtenenda. Tanzanio estas grundo kie ĝermas ĉiuj bonaj semoj. Nia lando estas ideala loko por diskuti la temon "Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo" kaj esplori la profundajn ligojn inter nia interagado kun nia natura medio kaj nia kapablo komuniki kaj kunlabori kiel homoj.
Profitu ĉi tiujn tagojn de interŝanĝoj, debatoj kaj renkontiĝoj por plifortigi la ligojn, kiuj kunigas nin preter vortoj. Kune, ni povas konstrui estontecon kie ĉiu voĉo estos aŭdata, kie ĉiu kulturo estos respektata kaj kie ĉiu individuo povos esprimi sin libere, en la lingvo de sia elekto.
Por ni gravas akcepti tiun ĉi kongreson por ankaŭ doni al vi la ŝancon sperti niajn urbon kaj landon kun ĝiaj naturaj parkoj, plaĝoj, faŭno kaj flaŭro kiel nepre vizitindajn kaj ŝirmejojn por ĉiuj.
Refoje la urbo Aruŝo bonvenigas vin al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto kaj deziras fruktodonan kaj riĉigan restadon al ĉiuj partoprenantoj!

**Maximilian Iranghe,** Urbestro de Aruŝo

---

Estimataj partoprenantoj en la 109-a Universala Kongreso!

Universala Kongreso en Afriko, tio estis la revo de mia edzo Hans Bakker.
Li estis Komisiito de UEA por disvastigi Esperanton en Afriko. Dum pluraj jardekoj li instruis Esperanton al multaj Afrikanoj el diversaj landoj en tiu kontinento. Tiun laboron li faris kun helpo de eminentaj Esperantistoj el aliaj – precipe Eŭropaj – landoj. Tiutempe (la jaroj 1980 kaj postaj jardekoj) oni studis la lingvon per paperaj lernolibroj, sendis la lecionojn per papera poŝto al la instruisto – kaj inverse. Tion ebligis Esperantistoj, kiuj donacis al Fondaĵo Afriko por ke la studentoj povu pagi la afrankon. Neimageble dum periodo en kiu regas Interreto!
Mia edzo ne ĝuis la realigon de sia revo. Sed sciu ke li tre ĝojus! Bedaŭrinde mi – pro personaj kialoj – ne ĉeestos la 109-an UK.
SED:
Mi vidas nomojn de aliĝintoj kiuj lernis la lingvon helpe de mia edzo. Sed multaj aliaj nomoj aperas. Pluraj el ili lernis la internacian lingvon de instruistoj ekster Afriko. Tion ebligis ”Fondaĵo Hans Bakker” kaj ILEI. Sed tiuj personoj, kapablaj instrui mem, faris tion grandskale. Tio estas triumfo de emancipado! Mi esperas ke inter la aliĝintoj el ekster la Afrika kontinento estas pluraj korespondamikoj. Bela okazo persone renkontiĝi. Kaj la Korto Bakker estas la unua oficiala kunvenejo dum la Movada Foiro.
La Kongresa Komitato kaj helpantoj prezentas interesan programon. Kompreneble pri la kongresaj temoj. Dum la ekskursoj oni havas la okazon konatiĝi kun la diversaj surlokaj kulturoj. (Gravas la produkto ‘Interkultura Gvidilo’.) Cetere la belega kaj diversspeca naturo allogas.
Al vi ĉiuj, kiuj ĉeestas tiun ĉi historie memorindan kongreson, mi deziras neforgeseblan periodon de harmonia laboro, interkonatiĝo kaj amikeco!

**Ans Bakker-ten Hagen**



Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt, Deutschland
*Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio*
Der Bürgermeister
*La urbestro*

esperanto urbo
Die Esperantostadt
HERZBERG am Harz

**Herzliche Gratulation** ***Koran gratulon***

Anlässlich des 109. Esperanto-Weltkongresses, des ersten in Afrika
***Okaze de la 109-a Esperanto-Mondkongreso, la unua en Afriko***
vom 03.08.2024 bis zum 10.08.2024
***de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024***
in Aruŝa - Tanzania
***en Aruŝo - Tanzanio***
gratuliere ich sehr herzlich in Namen unserer Stadt.
***mi kore salutas je nomo de nia urbo.***

Für diese besondere internationale Begegnung wünsche
***Por tiu ĉi internacia renkontiĝo mi deziras***
ich viel Erfolg, neue Freundschaften und Freude
***multe da sukceso, novajn amikecojn kaj ĝojon***
mit der internationalen Sprache Esperanto.
***per la Internacia Lingvo Esperanto.***

Christopher Wagner
Bürgermeister - *urbestro*

## Kelkaj utilaj esprimoj en la svahila

Tamen nepre ĉeestu la svahilajn lecionojn, sub la gvido de Charles Hiza, se vi estas lingvolernema aŭ simple interesiĝas pri la oficiala lingvo de Tanzanio. La kurso helpos al vi lerni la kutimajn kaj ĉiutagajn vortojn, parolatajn surstrate…

**Bonan matenon** – Asubuhi njema.
**Bonan tagon** – Mchana mwema/ siku njema
**Bonan vesperon** – Jioni njema.
**Kiel vi fartas?** – U hali gani?
**Mi fartas bone** – (Ni) mzima.
**Kaj vi?** – Na wewe?
**Bone** – Haya!
**Jes** – Naam! (Responde al alvoko)
**Jes** – Ndiyo
**Ne** – Siyo / Hapana
**Ne gravas** – Hamna shida
**Bonvolu** – Tafadhali
**Kie troviĝas la stacidomo?** – Stendi iko wapi?
**Kiel mi povas iri al AICC (la kongresejo)?** – Ninawezaje kwenda AICC (Eneo la mkutano)
**Glason da akvo, mi petas** – Ninaomba glasi ya maji
**Glason da biero, mi petas** – Ninaomba glasi ya bia
**Ĉu mi povas vidi la menuon?** – Ninaweza kuona menyu(orodha ya vyakula)?
**Kiom kostas? Bonvolu montri ĝin** – Inagharimu kiasi gani? Tafadhali onesha.
**Konduku min al…** – Nielekeze.....
**Parolu malpli rapide** – Ongea taratibu (polepole)
**[Multan] dankon** - Asante (sana)
**Mi estas en la ĉambro** – Niko chumbani
**Ĉu vi volas danci kun mi?** – Je unaweza kucheza na mimi?
**Bonan vesperon** – Habari za jioni
**Bonan nokton** – Usiku mnono
**Ĝis (la) revido** – Kwaheri
**Nedankinde** – Bila shukurani
**Mi petas** – Naomba
**Pardonu** – Samahani
**Bonan apetiton** – Furahiya; chakula
**Ĉu ne?** – Sivyo?
**Eble** – Labda
**Iomete** – Kidogo
**Tio estas bona** – Sawa sawa
**Mi nomiĝas…** – Ninaitwa…
**Estas plezure ekkonatiĝi kun vi!** – Asante kukuona!

Krome, ekzistas ankaŭ aliaj rimedoj por lerni la svahilan: unu el tiuj estas la apo *uTalk* per kiu vi povas senpage dum 6 monatoj lerni la svahilan (kaj/aŭ ekzerci vin pri Esperanto) danke al partnereco kun la 109-a UK: *uta.lk/esperanto*.

Vizitu uta.lk/esperanto aŭ skanu la QR-kodon →

## Bonvenigo ĉe la flughavenoj




Kongresanojn alvenintajn per aviadilo la LKK bonvenigados la tutan semajnon, en la korto de la Kilimanĝara kaj Aruŝa Flughaveno, tute fronte al la pordo el kie eliros ĉiuj alflugintoj. Tiu servo funkcias de la mateno ĝis la malfrua nokto, sed plej bone la alvojaĝontoj sin anoncu antaŭe per Vacapo aŭ Telegramo ĉe: +255 75 428 5388 aŭ +255 74 262 8430. Laŭplane la bonveniga servo plu funkcios ĝis la kongresa komenciĝo kaj en aparta interkonsento iom pli poste dum la kongresa semajno. Deĵoros laŭvicaj grupoj de tanzaniaj esperantistoj, inter apenaŭaj komencintoj kaj spertuloj. Krom simple bonvenigi, la volontuloj aranĝos veturigon al la kongresurbo aŭ laŭbezone klarigos pri kiel atingi specifan hotelon.

## Ekumena Diservo kaj Sankta Meso

Tradicia programero de la UK, la Ekumena Diservo okazos dimanĉon, la 4-an de aŭgusto je la 15-a en la katolika katedralo kaj paroka preĝejo Sankta Teresa (St. Therese of the Child Jesus Parish), adreso: JMHR+7HF, Goliondoi Rd, Arusha.
Post la Ekumena Diservo samloke je la 16-a horo okazos la katolika Sankta meso en Esperanto.
La Ekumenan Diservon kaj Sanktan meson prizorgas IKUE.
La ĉi-suba mapo klarigas kaj montras la vojon.
**Marija Belošević**, prezidantino de IKUE, kn. 306



## Manĝoservo dum UK en AICC

Por faciligi la kongresumadon en la unua afrika UK, estis aranĝita por ĉiuj kongresanoj surloka manĝoservo kun lokaj specialaĵoj kaj bongustaĵoj.
La manĝo funkcios pere de bufeda sistemo (oni elektas laŭ sia plaĉo tion, kion oni volas manĝi). Tiu ĉi servo rapidigos la manĝo-tempon kaj komfortigos nian komunan tempon.
**La kosto de la tuta menuo: 9 EUR aŭ 10 USD aŭ 30.000 TZS.** Eblos pagi surloke – ĉe UEA-kastisto en ĉiuj tri valutoj, aŭ pere de sia uea-konto, aŭ ankaŭ pere de la kreditkarto.
La prezo inkluzivas: ĉefan pladon, salaton, akvon, deserton aŭ fruktojn, kafon aŭ teon.
Manĝkuponoj estas aĉeteblaj ĉe la kasisto de UEA en la akceptejo.

Eblos aĉeti ankaŭ unuopajn manĝojn – la manĝkupono validos por ajna manĝo dum la semajno. (Sed por ŝpari tempon – kaj sian, kaj de la kasisto, kaj ne stari ĉiutage en la vico, ni rekomendas aĉeti prefere rekte manĝkuponojn por la tuta evento.)

Kune temas pri 9 manĝoj: sabata tag- kaj vespermanĝo, dimanĉon tagmanĝo, lundon tagmanĝo, sekve mardon/ ĵaŭdon/vendredon tagmanĝo kaj vespermanĝo. Manĝotempoj: tagmanĝo 12:30-15:30, vespermanĝo 17:30-19:30.

Rim.: Dimanĉon vespere okazos nacia vespero, kiu inkluzivos vespermanĝon. Lunde okazos komuna bankedo kaj balo. Do por tiuj ĉi vesperoj ne necesas aĉetadi biletojn. Dum la lasta sabato ne estos liverata tagmanĝo.

**Atentu:** Ĉi-sabate (3.8.) estos manĝo servata de 15:00 ĝis 18:00 (pro la alvenado de kongresanoj en ĉi-tago estos nur unu ĉefa manĝo, iom inter tag- kaj vespermanĝo).
Aldone tamen funkcios ĉiutage aldona refreŝigo: kafo/ teo, sukoj, etaj manĝetoj – jam de la mateno. (Sabate de 10:00, dum aliaj tagoj jam de 8:00.) Tiuj ĉi estos pageblaj rekte al la servistoj – tie oni akceptos kaj tanzaniajn ŝilingojn kaj usonajn dolarojn (sed ne eblos pagi per karto).

**Kongresa Fako de UEA**

## Kongresa fotoalbumo

Ĉu vi emas fari fotojn aŭ videojn? Ni ĝojas! Estu vi inter la fotistoj de la kongreso. Ĉar la oficiala kongresa fotisto ne povas esti ĉie (kaj certe ne en pluraj lokoj samtempe), ni invitas ĉiujn fotemulojn kaj videemulojn foti kaj filmi dum-kongrese.
Zorgu ke la fotado/filmado tamen ne ĝenas la prelegantojn kaj partoprenantojn. Dividu viajn fotojn kaj videojn en la komuna albumo *https://mallonge.net/uk-fotoj2024*.

## UEA-estrarano pri Afriko salutas



Karaj partoprenantoj en la unua UK en Afriko, karaj geamikoj,

Kun granda plezuro mi bonvenigas vin hodiaŭ al ĉi tiu historia Universala Kongreso de Esperanto, la unua UK en Afriko! Ĉi tio estas grava momento por ni ĉiuj, esperantistoj kaj geamikoj de Esperanto kaj de ĝiaj idealoj de komunikado, paco kaj unueco tra la mondo.

Esperanto, kreita de d-ro L. L Zamenhof por transcendi lingvajn barojn, ofertas al ni la ŝancon kunveni ĉi tie, sendepende de niaj originoj kaj kulturoj. Ni venas el diversaj landoj, kun diversaj lingvoj kaj tradicioj, sed ni ĉiuj kunhavas komunan revon: tiun de mondo, kie regas interkompreniĝo kaj kie ĉiu povas esprimi siajn pensojn kaj sentojn sen malhelpo.

Dum ĉi tiu kongreso, ni havos la ŝancon interŝanĝi niajn ideojn, partopreni en riĉigaj laborrenkontiĝoj kaj ĉeesti inspirajn konferencojn, prelegojn. Kune ni esploros la multajn aspektojn de Esperanto: ĝiajn kulturon kaj historion, kaj la eblojn per ĝi kreskigi interkulturan dialogon.

Mi invitas vin ĝui ĉiun momenton de ĉi tiu evento. Amikiĝu, dividu spertojn kaj provu lerni unu de la alia. Ĉiu el vi estas ĉi tie pro iu kialo, kaj viaj kontribuoj estas esencaj por la riĉeco de niaj diskutoj kaj la antaŭenigo de nia komuna afero.

Do, ni levu niajn glasojn al la spirito de malfermiteco kaj unueco, kiun ni festas ĉi tie hodiaŭ. Tiu ĉi kongreso estu fonto de inspiro kaj energio por ĉiu el ni, kaj ĝi fortigu nian sindevontigon al Esperanto kaj ĝiaj valoroj.

Dankon al vi ĉiuj kaj bonvenon al nia kongreso!
Kune, ni aŭdigu nian voĉon en diverseco kaj harmonio.

**Jérémie Sabyumva**
Estrarano de UEA pri Afriko

## Danckurso

En la kulturdomo *Via via* okazos senpagaj dancklasoj por ĉiuj danc-emuloj kaj -amantoj! Ne gravas ĉu vi estas komencanto aŭ sperta dancisto, ĉiuj estos bonvenaj! La kursojn gvidos junaj dancistoj de Aruŝo ĉiutage de la 11-a ĝis la 17-a horoj escepte de sabato kaj dimanĉo.
Proponataj dancstiloj estas: moderna danco, Hiphopo, Salso, Klasika danco kaj multe pli! Por registriĝi aŭ por pliaj informoj, informiĝu ĉe *Via via*. Venu kunhavi vian pasion pri danco kun la gejunuloj de Aruŝo kaj liberigu vian kreemon kun ili! Ĝis baldaŭ ĉe la dancejo!

**Martina Sachs-Bockelmann**, KN 248

## Nova sŭahillingva libro

Lige kun la ĉi-jara UK, la unua en Afriko, eldoniĝis nova




libro pri la sŭahila. Temas pri kolekto de kvar studoj rilataj al la sŭahila lingvo: lingva politiko, lingvistika komparo de Esperanto kun la sŭahila, sŭahila metriko, mallongaj informoj pri la legenda sŭahila poeto kaj heroo Mfumo Liongo. La libron produktis Nino Vessella kaj ĝi estas aĉetebla ĉe *https://mallonge.net/1f1* kaj ankaŭ laŭ la tradiciaj kanaloj de UEA, sed iom post la UK.

## Tanzaniaj gazetoj pri UK

Gazetara servo de Tanzanio funkcias. Unu el la plej legataj aruŝaj ĉiusemajnaj gazetoj *The ARUSHA NEWS* aperigis artikolon en la angla lingvo pri la kongreso kaj Esperanto. Vi povas tralegi La tekston en la cifereca gazeto *Saturday-July 24 – Friday, August 2, 2024* ĉe la retpaĝo *https://www.arushanews.co.tz/*.
Krom *The ARUSHA NEWS*, antaŭ kelkaj tagoj informis ankaŭ *THE TANZANIA TIMES* pri la 109-a Universala Kongreso de Esperanto.

**La Voĉo de Kilimanĝaro** estas la ĉiutaga Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, nun okazanta en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Legu ĝin por trovi informojn pri ĉiuj programŝanĝoj, raportojn pri pasintaj kaj venontaj eventoj. Tio helpos vin pli bone orientiĝi kaj pli agrable kongresumi. Viaj prikongresaj artikol(et)oj kaj fotoj estos danke ricevitaj ĉe la retadreso: *arusho.kuriero@gmail.com*.

## Vendo de SIM-karto por poŝtelefono

Vi venos al la 109-a UK kaj vi havas zorgon pri kiel trovi SIM-karton por via poŝtelefono aŭ vi jam estas en Aruŝo, sed ankoraŭ ne akiris SIM-karton por via poŝtelefono. Ne cerbumu plu! Vi povas pagi SIM-karton danke al partnereco de TIGO Plc. kun la kongreso.
SIM-karto plus 10Gb-datumpakaĵoj dum 3 semajnoj kostas1O USD. SIM-karto plus 16Gb-datumpakaĵoj dum 3 semajnoj kostas13 USD. Atentu: kiuj deziras e-SIM pagos 2 USD pli. Servoj de la telefonkompanio TIGO estas haveblaj ĉe la oficejo de LKK en la kongresejo – Ngorongoro Wing, 2-a etaĝo, ĉambro 218. Krome, dum la solena malfermo funkcios budo de TIGO. Memoru havi kopion de via pasporto sur vi por faciligi la aktivigon de via SIM-karto. La tuta procezo povas daŭri plurajn minutojn – do havu iom da pacienco! Estu konektita ĉiam! Ne hezitu viziti la ĉambron 218 por pliaj informoj.

## Dankvorte...



Aliĝis 836 homoj el kiuj: 2 Angolo, 5 Benino, 93 Burundo, 1 Centrafriko, 1 Gabono, 1 Gambio, 2 Kameruno, 7 Kenjo, 78 Kongo DR, 6 Madagaskaro, 1 Mozambiko, 5 Ruando, 7 Senegalo, 2 Sudafriko, 160 Tanzanio, 2 Togolando, 2 Ugando.
Pro problemo de validaj vojaĝdokumentoj kaj de malsano. iuj afrikaj aliĝintoj ne povis alvojaĝi Aruŝon por partopreni en tiu ĉi historia UK. Tamen, ni elkore dankas al vi ĉiuj – esperantistoj kaj amikoj de Afriko – kiuj monsubtenis por ebligi la kongresanigon de multegaj afrikanoj. Apartan elkoran dankon al Institucio Hodler pro la donaco al la kongreso!

## Nova eldono de *Zagreba Metodo*

Aperis nova eldono de lernolibro de Esperanto laŭ la *Zagreba Metodo* ĉi-foje en la svahila lingvo, publikigita de Kroata Esperanto-Ligo. La lernolibron adaptis al la svahila burundano Eric Nsabiyumva. Kelkaj ekzempleroj de la libro estas senpage donataj al Esperanto-bibliotekoj kaj kelkaj esperantistoj, el kiuj la redaktoro de *La Voĉo de Kilimanĝaro*.




Apoge de Esperanto-Klubo Rijeka de Krotio, la lernilo estas dum la kongresa semajno mendebla ĉe John Magessa kaj ankaŭ per la tradiciaj kanaloj de UEA kontraŭ pago de 6 eŭroj. Ĝi estas bela suveniro por ĉiu kongresano de la unua UK en Afriko sed ankaŭ ebleco donaci al esperantistoj en Afriko per svahila lernolibro. La libro estas ne nur interesa ĉar ĝi enhavas riĉan svahilan vortprovizon, sed ankaŭ la vortoj de la unua tri lecionoj estas kanteblaj... Se venos multaj interesitoj, la libro estos denove represita. La svahilingva versio estas entute la 22-a lingvo en kiu lernilo de Zlatko Tišljar estas presita. En multaj pliaj lingvoj la lernilo estas konsultebla ĉe *https://esperanto12.net*.

**KN 398**

## La loko por la Nacia vespero ŝanĝita

Anstataŭ dekomence planita loko oni veturos al alia loko – kie okazos la Nacia vespero – *Meru/usa forest plantation*. La loko troviĝas en natura arbaro, survoje al la monto Meru. Nepre do prenu kontraŭmalvarmajn vestaĵojn, ev. ion longmanikan (oni estos ekstere). Survoje oni vidos la apudan akvofalon kaj la urbon Aruŝo de supre.